



LA CIRKLO

Redaktoroj: KIM Kukjin kaj CHOE Taesok; ds@esperanto.lt
Eldonanto: KIM Sang-ik; tel. 011-658-6366; wk2000@kornet.net
http://www.uonbulismo.net http://cafe.daum.net/zinio81

ORGANO DE ESPERANTISTA ASOCIO DE UONBULISMO | 원불교에스페란토회 기관지

N-RO 11 | 2008 10 01

SALUTVORTOJ | 국제선방 명상

김상익
(원불교에스페란토회장)

국제선방은 외국인들에게 한국을 체험할 수 있는 기회를 주고 한국을 세계에 알리려는 국가적인 프로젝트에 의하여 각 종단에 배려하는 예산의 일부를 배정받아 원불교 국제부에서 주관하여 매년 1-2회 실시하고 있었으며, 3년 전(2006년)부터 에스페란토를 통한 국제선방을 개설하게 되어 3회째이지만 금년에는 원불교 에스페란토회에서 직접 주관하게 되었다.



나는 명목상 회장으로 있으나 모든 회원들이 협조하고 직접 주인역할을 하지 않으면 아무 일도 할 수 없는 상황이다. 모두 직장에 매어있기 때문에 평소에는 1주일에 한 번 정도 공부를 위한 모임이 있을 뿐 자주 만나기 어려운 사람들이다. 그래서 언어실력도 부족하지만 행사를 주관한다는 것은 더욱 어려운 일이었다. 그래도 회원들에게 교도로서 국제교화에 관심을 가지고 협력할 수 있는 일이 있다는 긍지를 심어주고, 언어실력 향상을 위한 기회를 만들기 위하여 방학을 이용하여 국제부 협력하에 계획을 세우고 8월 6일부터 10일까지 4박 5일간 국제선방을 주관하게 되었다.

그래서 준비위원회를 구성하고 이종기(안양교도) 위원장을 비롯하여 모든 위원들이 방학이라지만 각기 개인사정이 많은데도 불구하고 휴가를 반납하여 이 일에 매달려 준비하지 않으면 안 되었다.

더구나 기금이 없기 때문에 교역자들도 그렇지만 정토로서 또는 주부로서 어려움이 많을 텐데 일이 있을 때마다 호주머니 돈을 써가며 일하는 모습을 보면서 안타까운 마음이 들었다.

국제부에서 예산을 지원하였지만 우리가 계획대로 일을 원만히 진행하기 위해서는 턱없이 부족한 돈이었다. 그래서 내 마음은 더 무거웠고 준비위원들은 힘든 활동을 해야 했다.

마지막 행사일이 임박해 오면서 재정적인 해결이 어려운데다 프로그램 자료마저 완성되지 못하여 우리는 더욱 긴장되고 불안한 마음이 들기도 했다. 그

ENHAVO | 목차

Salutvortoj.....	1
국제선방 명상	
Prediko	2
정산종사 법문	
Internacia Esperanto-Renkontiĝo	3
특집 국제선방	
Faka Kunsido en la Roterdama UK.....	6
로테르담 세계대회 원불교 분과모임	
Junulara Renkontiĝo	7
원불교와 오오모토 청년 만남	
Ceteraj Agadoj kaj Anoncoj	8
기타 활동 및 공지	

래도 다행인 것은 그동안 이종기 교수의 평소 쌓은 인연과 노력으로 계획된 훈련인원이 거의 신청되었고, 오직 국제부의 후원과 지난 해까지의 경험을 바탕으로 우리 모두의 간절한 소망과 노력이 있다면 잘되리라는 신념이 우리에게 힘을 보태 주었다.

그러나 몇 명되지 않는 회원들이 각지에 흩어져 있고 이종기 교수와 김인소 교무님은 세계대회에 참석하느라 10여일간 해외에 있었어 결국 일할 사람은 국제부의 이경천 교무와 오순모님, 한숙희님 세 분이 무더위를 친구삼아 움직일 수밖에 없었다.

나는 내가 맡은 원고준비도 해야 했지만 예산을 맞추기 위하여 박용신님과 노심조사하면서 마음고생을 감수해야 했다. 다행히 인연들의 도움을 받을 수 있게 되어 부부의 인연 때문에 어쩔 수 없이 함께 해야 하는 어려운 마음고생을 한 여름 무더위에 소낙비처럼 시원한 쾌감으로 승화시킬 수 있었으리라 생각한다.

마음으로 몸으로 물질적으로 고생하신 모든 분들에게 감사를 드린다. 특히 번역과 편집을 위하여 모처럼 한국을 찾아 가족 여행을 하면서도 쉬지 않고 밤잠 설치면서 고생하신 최보광 원무님과 이 행사를 원만히 마치고 소기의 결과를 얻을 수 있도록 프로그램을 진행하고 발표를 해 주신 모든 분들에게 미안한 마음과 함께 깊은 감사를 드린다.

끝으로 한방건강TV의 신산 박오진 사장과 원불교 중곡교당 회장(목산 이종선, 현탁원 박현만)내외분의 후원으로 어려움을 극복하게 된 것을 크게 감사하며 지중한 인연 소중한 만남으로 기억하고 싶다. 모두에게 건강과 사업의 번창을 기원한다.

우리 함께 이길을 ~~~ 김 상익 마음을 觀照하다.

KIALOJ KREDI RELIGION

Ĝongsano¹

Ordinaraj homoj serĉas religion unue por forigi maltrankvilon en la vivo kaj akiri trankvilon, due por apogi sin sur absolutulo kiel dio aŭ budho kaj forpeli malsanon kaj katastrofon, trie por peti estontan feliĉon en la nuna malfeliĉo kaj eternigi la nunan feliĉon, kvare por bonfarti nunvive kaj ankaŭ enparadiziĝi postmorte kaj por havigi senliman feliĉon ne nur al si, sed ankaŭ al ĉiu sia idaro.

Sed la instruo de progresinta religio ne limiĝas al individuo aŭ kelkaj homoj, sed anigas ĉiun homon al la eklezio de granda vojo kaj igas ilin iluminiĝi pri la vero de ĉiuj estaĵoj en la universo kaj faras ilin budho kaj sanktulo per kredo kaj praktikado.

Budho trovis la originan veron de ĉiuj estaĵoj en la universo, sed ordinaruloj ne povas trovi ĝin kaj ankaŭ multaj homoj eĉ neas ĝin. Tio ja estas pli stulta ol ĵusnaskiĝinto neas sian patrinon. Ni studantoj celu trovi la veron de unu cirklo² klarigitan de Sotesano³ kaj preni ĝin kiel la fonton de religio kaj moralo. Maniero ekkoni kaj trovi la veron de unu cirklo estas ĝuste la tri studoj⁴ kaj la ok sintenoj⁵.

Kio ja estas feliĉo de religia vivo, nome, de kredo? Al ni kredo estas ripozejo, konsolejo, fajrobrigadejo, malsanulejo, lavbutiko kaj nutraĵodonejo. Mi detale klarigu ilin.

La unua feliĉo de kredo estas ripozejo. Ni serĉas lokon, kie ni ripozigas lacan spiriton kaj komplikan menson, same kiel ni serĉas ripozejon por la korpo. Ni jam serĉis tian lokon, kiel do tio ne estus feliĉo?

La dua estas konsolejo. Ĉiuj homoj de la mondo volas konsoliĝi, sed per ĉi tiu kredo oni mem povas konsoli sin. Ĝenerale, por konsoliĝi homoj malkaŝas siajn ĉagrenon kaj zorgon al aliulo, sed se ili ne konsoliĝas, ili pli sentas aflikton kaj suferon. Tamen homo kun kredo preferas konsoli sin ol konsoliĝi de aliulo kaj eĉ povas konsoli kaj trankviligi aliulon, kiel do tio ne estus feliĉo?

La tria estas fajrobrigadejo. Kiam domo brulas, homoj de la mondo sciigas al fajrobrigadejo kaj estingigas la fajron per aliula forto, sed ili ne scipovas estingi la ajntempe flamantan fajron de sia menso. Tamen ni ja scipovas estingi la fajron de nia menso kaj ankaŭ tiun de aliulo, kiel do tio ne estus feliĉo?

La kvara estas malsanulejo. Ĉiuj homoj de la mondo bone scias malsanon de sia korpo kaj klopodas kuraci



ĝin, sed ne scias malsanon de sia senforma spirito, nek volas kuraci ĝin. Sed ni trovas malsanojn de nia spirito (malsanojn de plendo, de dependo, de maldiligento, de prokrasto kaj de farigo al aliulo), kuracas ilin kaj ankaŭ tiujn de aliulo, kaj lernas eĉ farmacion kaj medicinon, kiel do tio ne estus feliĉo?

La kvina estas lavbutiko. Kiam vesto estas malpura, homoj de la mondo, ĝin mem lavinte aŭ laviginte al lavbutiko, portas la malnovan veston kiel novan veston. Tiel same, kiam ni de tempo al tempo alfrontas suferon, malĝojon kaj malfacilon, ni trovas lavbutikon, kiu lavas kaj novigas nian menson, kaj ni lernas la manieron lavi la malpurajojn

de nia menso kaj fariĝas novaj homoj kaj laborantoj kun novaj menso kaj espero, kiel do tio ne estus feliĉo?

La sesa estas nutraĵodonejo. Ni jam bone sciis materian nutraĵodonejon por la korpo, sed ne sciis nutraĵodonejon por la spirito. Tamen ni ekkredis ŝonbulismon kaj trovis ĝian templon. Ja ĉi tiu templo estas feliĉokampo kaj saĝokampo. Ni ĉiam trovas kaj scias la lokon, kiu donas al ni en ĉiu darmkunveno⁶ kaj en ĉiu trejnkurso tiel senlimajn instruojn, nutraĵojn de la spirito, kiuj estas superfluaĵoj eĉ post nia uzo tra la eterna vivo, kiel do tio ne estus feliĉo?

1. Ĝongsano: esperantigita el la korea vorto *Ĝongsan*, alnomo de *SONG Gju* (1900-1962), pastro, ĉefdisciplo de Sotesano, ĉefmajstro de ŝonbulismo (1943-1962).
2. Unu cirklo: per ĝi Sotesano esprimis la fonton de ĉiuj estaĵoj en la universo, la mensosigelon de ĉiuj budhoj kaj sanktuloj kaj la naturon de ĉiuj vivuloj.
3. Sotesano: esperantigita el la korea vorto *Sotesan*, alnomo de *BAK Ĝunghin* (1891-1943), fondinto de ŝonbulismo.
4. Tri studoj: unu el la kernaj doktrinoj de ŝonbulismo, t.e. spirita kultivo, afera-principa esploro kaj justaga elekto, kiuj praktikendas por atingi la personecon de budho kaj unuiĝi kun la vero de Ilŭon.
5. Ok sintenoj: unu el la kernaj doktrinoj de ŝonbulismo. Ili konsistas el la kvar havendaj (kredo, sinkuraĝigo, scivolo kaj penado), kaj el la kvar forigendaj (nekredo, avido, maldiligento kaj malsaĝo).
6. Darmkunveno: diservo de ŝonbulismo.

* Tradukis CHOE Taesok



3a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Ŭonbulismo sukcese okazis de la 6a ĝis la 10a de aŭgusto 2008 en Seulo.

FERMA RAPORTO

HONG Sungcho / Koreio

Saluton, karaj ĉeestantoj!

La tempo tiel rapide kuris kiel sago. Fino venis la momento por adiaŭi. Promesante la sekvajaran renkontiĝon, mi raportas pri ĉi renkontiĝo.

Dum ĉi-foja 5-taga renkontiĝo ĉeestis 49 esperantistoj, inkluzive 15 alilandanojn el 4 landoj (Litovio, Ĉinio, Japanio kaj Nederlando). Okazis la jenaj programeroj; 4 religiaj prelegoj (Kompendio pri Ŭonbulismo, Meditgimnastiko I-II, Moderna scio kaj medito), 4 nereligiaj (Kantotradukado, Konversacio, Birdoj de Koreio, Azia movado), 7 aktivaj agadoj (Korea tradicia ludo *jutnori*, Ekskurso, Bankedo, Korea tradicia kuirarto - ruĝfabaj nudelo kaj kaĉo, Farado de *Ŭonmani*, Interkona vespero, Adiaŭa vespero), kaj 2 ceremonioj (inaŭgura kaj ferma). Kiel specialaĵo, la organizantoj neatendite preparis la 1an Internacian Konkurson de *Ŭonmani*-Farado, kie partoprenis reprezentantoj el 3 landoj. S-ino Lumo el Koreio gajnis la unuan premion.

Dum la renkontiĝo mi ekvidis, ke ĉeestantoj ŝajne kontentis je 85%, sed ni organizantoj kun la tuta forto klopodis por 100%. Irante al kaj venante de la manĝejo mi aŭdis de ĉeestantoj, ke la programeroj estas pli interesaj kaj utilaj ol tiuj de Universala Kongreso. Mi bone scias ke ĝi estas fakte ŝerco. Malgraŭ tio, tiuj vortoj multe kuraĝigas kaj instigas nin, organizantojn.

Notinde estas jene:

Kvankam al la samĉambranoj estis donita tiel mal-longa tempo por montri sian solidarecon en la adiaŭa vespero, ili vere genie kreis planojn kaj ĉiuj estis sur-

prizitaj. Precipe, la samĉambranoj nomataj kiel *Brazilia de Ŝlosilo* preskaŭ ridmortigis ĉiujn aliajn. Oni facile ne povus forgesi tiun adiaŭan vesperon. Hieraŭ malfrunokte, kelkaj ĉeestantoj ŝerco diris al mi, ke se la organizantoj, preparante la sekvan renkontiĝon, havos planon limigi enlandajn partoprenantojn, ili volas nun plenigi la aliĝilon antaŭ la adiaŭo kaj antaŭpagi la kotizon. Ni antaŭdankas al ili, kiuj entuziasme montris al ni siajn interesojn.

Ni organizantoj tuforte laboris kaj vi ĉeestantoj entuziasme reagis. Tial la renkontiĝo progresis en bona ordo, mi opinias.

Mi esperas, ke vi forgesos ĉiujn nebonajn kaj neplaĉajn aferojn, sed vi longe memoru nur bonajn kaj belajn aferojn okazintajn dum la renkontiĝo. Ĉiam kaj ĉie vi estu sanaj kaj feliĉaj ĝis la sekva renkontiĝo.

Mi finas mian raporton. Dankon.



▲ *Ŭonmani* estas homfigura kolringo farita el ŝnuroj kaj bidoj por kontroli uzon de la ses sentorganoj 원만이 만든 리투아니아인

MIAJ IMPRESOJ PRI PRELEGOJ

Yasuo Tabuči / Japanio

Mi restis en Koreio de la 5a ĝis la 9a de aŭgusto kaj ĝuis la vivon. Ĉi tiu vizito estis la 4a kaj plej neforgesbla por mi. Mia vojaĝo komenciĝis de la bonvenigo de Ŝlosilo kaj liaj junaj gestudentoj en la flughaveno; f-inoj KANG Haejin (*Favora*), BAEK Suhyeon (*Prena*) kaj s-ro KIM Taewoo (*Helpano*). *Favora* kaj *Prena* ĉeestis en la renkontiĝo kaj mi rerenkontis *Favora* en Oomoto-Junulara Festivalo en Kameoka.

En la mateno de la 6a mi kun s-ino LEE Namhaeng vizitis la insuleton *Nami*, kiu estas tre fama por la filmejo de 'Vintra Sonato' sub la gvido de japanlingva ĉiĉerono. Kial 'Vintra Sonato'? Ĉar al mi jam okazis certe la sama rakonto kiel 'Vintra Sonato' en mia juneco kaj la ĉefaktorino, CHOI Ji-Woo, estis certe sama al mia etulino en tiu tempo. Ĝis nun mi bone memoras la rakonton konkrete, ke ĝi estas vere romantika, aktorino estas belaspekta kaj *Yujin* rektanime amas *Junsang*! Al mi, la plej romantika korea dramo estas 'Vintra Sonato', tamen la plej kortuŝa estas 'Kuracisto *Ho Joon*'. Estis tre varme en la insuleto *Nami*, sed por mi vere neĝis en mia imago.

Posttagmeze en la sama tago, mi salutis ĉeestantojn reperezentante Oomoton en la malferma ceremonio. Kaj vespere, post la manĝo okazis interesa kaj amuza Interkona Vespero. Per la partopreno de litovaj, nederlanda, ĉinaj kaj japana geamikoj la 3a Renkontiĝo

▼ Yasuo Tabuči gvidas japanan dancon en la interkona vespero.
일본 춤을 선보이는 야수오 타부치



fariĝis vere internacia. Prof. LIM Tonghyeok (koreo) bone ludis harmonikon. La titolo estis *Ĉingu* (amiko) de landskale fame konata kantisto CHO Yongpil. Mi bone scias tiun kantiston kaj povas eĉ kanti kelkajn liajn kantojn. La kantoj de amikoj el Harbino de Ĉinio estis interesaj. Precipe la kanto por Pekinaj Olimpikoj estis ĝojplenaj. Mi el Japanio estis tre feliĉa, ĉar multaj sekvis min dum mia dancado. Mi pensis, ke programeroj estis enhavoriĉaj kun prelegoj, kelkfojoj da ekzercoj de medito-gimnastiko, promenado, ĉiumatena meditado, ekskurso, bankedo.... Kaj manĝaĵoj estas luksaj kaj tre bongustaj danke al la trejneja estrino, kiun mi vokis 'Omoni' (patrino) koree.

Jen estas miaj impresoj pri prelegoj:

1. Kompendio pri ŭonbulismo (de la pastro KIM Sang-ik) donis al mi profundan kompreniĝon pri ŭonbulismo. Mi sentis, ke Oomoto estas kelkajn jarojn pliaĝa frato kaj ŭonbulismo estas juna frato kaj ni povas kune agi kaj preĝi por mondpaco!
2. Kantotradukado (de CHOE Taesok) estis tre kleriga leciono! Mi deziris praktiki lian instruon en Oomoto-himno kaj mia poemo. Lia talento mirigis min.
3. Konversacio (de HONG Sungcho) estis tre impona kaj mi volas imiti lian instrumanieron en Esperanto-kurso en la Transjara Kurskunveno en Oomoto. Li ja estas tre bona instruisto.
4. Korea tradicia ludo *jutnori* (de CHO Myung-ja) estis tre ekscitiga kaj amuza! Aŭdiĝis de loko al loko krioj, babiladoj kaj ridoj! La ludo estis vere interesa.
5. Meditado estis tre alloga! Min kortuŝis la meditata ĉantado 'Namuumitabul'. Mi sentis min sidante en la preĝejo, kvazaŭ mi estus en la brusto de patrino.
6. Azia Movado (de LEE Jung-kee) estis tre interesa. La prezidanto de KAEM montris al ni ne nur ĝisnunan movadon, sed ankaŭ la direkton kaj strategion de Azia Movado. Mi konfirmis, ke mia malnova amiko, ricevinto de la premio *Deguĉi Onisaburo*, tenis la 'Ŝlosilon', per kiu li malfermas la pordon de nova tajdo kaj dinamika agado de Esperanto!
7. Birdoj de Koreio (de HONG Sungcho) ankaŭ estas tre kleriga, interesa prelego kun la programo 'Power Point'. Mi lernis multon de li! La plej ŝokiga kaj interesa estis la ekzemplo de la parazita birdo, kukolo! Mi sentis, ke en la homa mondo ekzistas tia homo, kiu tre similas al kukolo. Estis ja bonega prezentado, tre atenteme preparita.
8. Ekskurso kaj bankedo. Mi ĝuis marŝon, ŝvitojn, manĝaĵojn kaj babiladon! Mi dankas ŭonbulanojn kaj organizantojn pro luksaj manĝaĵoj en la bankedo!

En mateno de la 9a mi forlasis la renkontiĝejon pro mia tagordo reveni al Japanio. Mi esprimas mian elkoran dankon al pastro KIM, prelegantoj, organizantoj kaj bonaj amikoj pro viaj bona subteno kaj helpo!

HAZARDAJ PENSOJ PRI LA VOJAĜO

ZHAO Ning / Ĉinio

Mi studas en Heilongjiang Sciencteknika Instituto, Ĉinio. Mi sekvis prof. SONG Ping por partopreni en la 3a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Ŭonbulismo de la 6a ĝis la 10a de aŭgusto, 2008.

Mi pasigis neforgeseblajn 10 tagojn. Ni loĝis en la Junulara Trejnejo de Ŭonbulismo, kiu estas malgranda, sed bela vilao. Ĝi havas ĉarman ĝardenon, monteton kaj fluantan akvon laŭ eŭropa stilo.

La Esperanta semajno havis riĉan kaj multkoloran enhavon. Mi konatiĝis kun multaj fremdlandaj amikoj. Ili havas siajn karakterizaĵojn kaj humurojn. Mi ĝuis varman gastigemon de koreaj esperantistoj.

La kvin tagoj de la renkontiĝo finiĝis rapide, ni transloĝiĝis al templo de Ŭonbulismo (sub la helpo de la organiza komitato). Ĉi tie mi ankaŭ loĝis kaj manĝis senpage. Ĉiutage ni havis varmajn koreajn volontulojn (*Helpano kaj Oriento*) akompanis nin. Ni travivis korean moron, kvankam la distanco inter nia loĝejo kaj iliaj domoj estas malproksima. Ili bezonis 2 horojn per aŭto, sed ili kiel antaŭe ne sentis sin lacaj.

Kiam *Oriento* akompanis nin, ni vizitis la 63-etaĝan domegon, kiu estas la plej alta konstruaĵo en Koreio. Ĉi tiu loko havas multe da ludobjektoj kaj ni admirisla belan *Han* riveron, en kiu unu kulmino sekvas alian. Poste, ni faris viziton al *Namdaemun* kaj *Dongdaemun* kaj la fama *Myeongdong*, en kie ni aĉetis iom da memorigaĵoj por niaj ĉinaj gepatroj kaj amikoj.

Tiu vojaĝo al Koreio, kiu postlasis al mi fortan impreson, fariĝos unu supere bela bildo kaj ĉiam restos en mia memoro. Mi estas nun komencantino de Esperanto, sed mi klopodas lerni Esperanton diligente. Se mi parolos Esperanton flue, mi povos renkontiĝi kun multaj amikoj. Same, per Esperanto ni ĝuas tiun puran amikecon sen landlimoj. Per kontaktoj kun alilandaj esperantistoj, mi lernos multon utilan.

Ĝis, la ĉarma Koreio kaj karaj samideanoj!!!



▲ Ĉinaj partoprenantoj (ZHAO Ning maldekstre).
국제선방 중국 참가자

FOTORAPORTO

KIM Kukjin / Koreio

Jen estas kelkaj fotoj de la renkontiĝo:



▲ Ĉefprelegas direktoro de la internacia fako de Ŭonbulismo.
결례식 김상호 국제부장 설법



▲ Kun gaja bruo ĉeestantoj ludas la korean ludon *jutnori*.
즐겁게 윗놀이를 놓고 있다.



▲ Internacia Konkurso de Ŭonmani-Farado
즉석 조직된 원만이 만들기 국제대회



▲ Koreaj partoprenantoj kun SONG Ping (dua de dekstre)
중국 송 핑 교수와 한국인 참가자들



▲ 4a faka kunsido de ŭonbulismo en la UK okazis en julio, 2008. Pastrino KIM Inso prezentas meditgimnastikon. 네덜란드 로테르담에서 열린 세계에스페란토대회 원불교 분과모임에서 김인소 교무님이 선체조를 소개하고 있다.



▲ Ĉeestantoj memorfotiĝas kun la pastrino kaj Ŝlosilo 분과모임 참가자들과 기념촬영



▲ Litova ŭonbulano Arūnas Kazlauskas disdonas donacetojn. 기념물을 나눠주는 리투아니아 교도 Arūnas (foto: Aleksas)



▲ Du ŭonbulanoj en la Kulturturisma Semajno en Herzberg 에스페란토 도시, 헤르츠베르크 행사에 참가



▲ Mirejo, svisa esperantisto vizitis ŭonbulanojn en Iksan, 2008 스위스 에스페란티스토 익산 방문 2008년 10월

SONG Ho-young (Prez. de KEJ)

Kiam mi pasintjare okupiĝis pri la 26a Komuna Seminario, preskaŭ samtempe mi eklaboris kiel letertradukanto kaj helpanto inter la junulara fako de Oomoto kaj la organizo 'Amikoj de Paco' apartenanta al la Junulara Asocio de Ŭonbulismo. Kvankam mi ne estas Ŭonbulano, mi volonte akceptis la rolon kiel simpatianto al ambaŭ du religioj.

Tiu ĉi renkontiĝo estis decidita en la 9a de aprilo en 2007, inter la ĝenerala sekretario de la Amikoj de Paco, *Yun Bup-dal* kaj la prezidanto de la junulara fako de Oomoto, *Naruo Tadaŝi*. Laŭ la rezulto de la kunsido, La Amikoj de Paco ĉi-jare sendis Ŭonbulanajn gejunulojn al Oomoto ekde la 12a ĝis la 15a de aŭgusto, kaj venontjare junaj oomotanoj vizitos Koreion.

La 12an de aŭgusto, al Kansaja flughaveno alvenis 6 koreaj partoprenantoj inkluzive de s-ro *Yun Bup-dal*, Ĉe la flughaveno nin varme bonvenigis s-ro *Okuwaki Toshiomi*, kiu respondecis pri kontakto kun la Amikoj de Paco. Ni kune veturis al Kameoka per la buso preparita por koreoj. La Junulara Festivalo de Oomoto mem komenciĝis ekde la 13a, sed en la vespero de la 12a okazis eta kunveno por bonvenigi koreajn junulojn. Kolektiĝis ne nur estraranoj de la junulara fako de Oomoto, sed ankaŭ gravaj funkciuloj de Oomoto kaj Esperanto-Populariga Asocio. En gaja etoso ĝenerala sekr. *Yun Bup-dal* kaj prez. *Naruo Tadaŝi* interŝanĝis donacojn kun granda aplaŭdo. Sekve ĉiuj koreaj partoprenantoj ĝuis la bankedon kun danco, kanto kaj gitarludo.

La 13an, ni ĉiuj vekiĝis frumatene por ĉeesti en matena preĝado en la plej granda kaj ĉefa preĝejo Banŝooden. Kvankam la ĉeesto ne estis deviga, ni klopodis laŭeble fari tion. Matenmanĝinte koreaj partoprenantoj kaj junaj oomotanoj kune ekveturis por ekskurso al Kioto. Ekskursanoj vizitis la budaisman templon *Kinkakuji*, kaj la ŝintoisman sanktejon *Kamigamojinja* kaj la fame konatan kastelon *Nijo* kaj ankaŭ la pitoreskan turismejon *Arashiyama*.

Reveninte al la Oomoto-centro, okazis la solena malfermo de la Junulara Festivalo de Oomoto. En ĝi koreaj partoprenantoj denove sin prezentis antaŭ ĉiuj oomotanaj ĉeestantoj, kiuj sidis dividite laŭ siaj regionoj. Vere surprizis koreojn la reagoj de junaj oomotanoj, ĉar ili almenaŭ sciis pri bazaj vortoj por saluti kaj danki en Esperanto. Ĝenerala sekr. *Yun* prezentis al ĉiuj partoprenantoj Ŭonbulismon kaj disvolvadon de Amiko de Paco per klarigo kaj filmeto.

En la 14a, koreaj partoprenantoj kaj kelkaj oomotanaj junuloj kune vidis la filmojn titolitajn 'Paŝoj de Oomoto' kaj 'Uta-festo', kiuj bone klarigas historion, kulturon kaj festivalon de Oomoto. Post la rigardo, mi resume tradukis la enhavon en la korean por koreoj, kaj ili demandis s-ron *Okuwaki* precipe pri internacia

agado de Oomoto. Post tio ni promenis en la sankta tereno de la Oomoto-centro, sub la gvido de s-roj *Okuwaki* kaj *Onizuka*. La historio de Oomoto, pri kiu ni vidis jam en vidbendoj, estis bone respregulitaj en ĉiuj aspektoj de la sankta tereno. Estis bona ŝanco pli profunde kompreni Oomoton.

Alia grava okazo estis interreligia kunsido kun estraranoj de la junulara fako de Oomoto. Dum la vigla kunsido, mi kaj s-ro *Okuwaki* interpretis inter du flankoj. Ni diskutis precipe pri organizado de la venontjara renkontiĝo en Koreio. S-ro *Yun* respondis, ke provizora plano estas partoprenigi junajn oomotanojn unue en la 4an Internacian Esperanto-Renkontiĝon de Ŭonbulismo kaj sekve havi apartan aranĝon kune kun junaj Ŭonbulanoj, eventuale per hejmgastigado.

Vespere komenciĝis interkona vespero en ekstera placeto. Junaj oomotanoj amuzis ĉeestantojn per ludo kaj komika skeĉo. Koreaj partoprenantoj kantis sur la podio la Ŭonbulana kanton *Ĉiame lumas luno*. Kaj ĉiuj kune kantis faman japanan kanton *Ueŭomuite arukou*. Ankaŭ jodla ludo de s-ro *Lim Jung-hyeon* ricevis varman aplaŭdon. Poste ĉiuj kune faris *Miroku*-dancon, rondirante ĉirkaŭ muzikludantoj.

En la lasta 15a, dum la ferma ceremonio, koreaj partoprenantoj havis honoron aŭdienci la spiritan gvidantinon de Oomoto, *Deguĉi Kurenai*. Aŭdienco kun granda majstro de iu religio estas iasence tre streĉiga kaj ŝvitiga, sed ŝi elkore salutis nin kun trankviliga kaj afabla rideto. Ĉeestinte la ferman ceremonion de la festo, koreoj ekiris al Kansaja flughaveno por reveni al Koreio, kunportante multajn donacojn de Oomoto.

Kiel helpanto kaj interpretanto, mi kredas, ke tiuj ĉi interreligiaj renkontiĝo kaj kunlaboro per Esperanto estas tute raraj almenaŭ en Azio, kaj sendube karaj kaj valoraj. Mi tutkore esperas, ke la renkontiĝo sukcese daŭru kaj kontribuu al ne nur nuna, sed ankaŭ estonta rilato inter la du religioj.

Ĉar junuloj estas novaj kernoj, kiuj efektive antaŭen puŝos la agadojn en la komuna estonteco. Mi elkore dankas la junularan fakon de Oomoto en ĉiuj sencoj, kaj ne malpli grave ankaŭ s-ron *Yasuo Tabuĉi*, kiu klopodis bone prizorgi koreajn junulojn dum la festivalo.



- ★ 방문
세계 에스페란토 시험 위원장이며 스위스 에스페란토 회장인 미레요씨가 9월 24~26일 익산을 방문했다.
24일 이원일님과 국제부 방문, 원불교 신문 인터뷰, 원대 수업 참관
- ★ 제40차 한국에스페란토대회
주제: 미래를 향한 에스페란토-변화의 요구속에서 (Esperanto en Perspektivo: En la Nova Ondo de Monda Civilizacio)
일시: 2008년 10월 18(토) - 19일(일)
장소: 오마이랜드 부산(부산 금정구 금성동 151)
전화: 051-517-5111
* 상세 내역, 각종 신청 및 문의처
협회 누리집 <http://www.esperanto.or.kr>
전화: 02-717-6974 팩스: 02-717-6975
이메일: kea@esperanto.or.kr
- ★ 동안양교당 에스페란토 강습안내
개강: 2008년 10월 9일 오후 3시-5시.
매주 목요일 6회
장소: 원불교 동안양 교당 (031-426-6611)
수강료: 5만원 (교재 포함)
참가대상: 안양 시민 누구나
강사: 이중기 원장(에스페란토 문화원)
앞으로 전교당으로 확대되어 꾸준하게 원불교 에스페란티스트들이 배출되어 활동하기를 기대해 봅니다. 그리고 많은 강사들도 나와야겠습니다.
- ★ 익산지회 회의
일시: 9월 10일
참석자: 김인소, 김국진, 박영숙, 오순모
* 안건 1 - 회보 편집
이번 회보는 세계대회 국제선방 특집으로 함
회보 발송은 모든 교당에 보내지 않고 에스페란토어에 관심이 있는 분께만 보내드리는 게 좋겠음.
국제선방 후원금, 회비 수입 등 회보에 올림
회보내용에 원불교 교리와 국내외 참석자 후기담
한국대회 원불교 분과 및 폴란드 세계대회 홍보
* 안건 2 한국대회
원불교 분과 프로그램 및 역할 담당
사회: 원익선 교무님
- ★ 설교: 김상익 회장님(10분)
심고: 한숙희(3분)
선체조 및 성가: 김인소교무님(15분-20분)
국제선방 영상보고: 김국진교무님(10분)
법회보 편집 및 인쇄: 김국진 교무님
*기타
국제선방 앨범 만들기로 함 (김국진 교무님)
- ★ 회원동정보고
장경원 교무님이 추석 지나고 퇴원하셔서 당분간 서울 동생댁에서 요양할 계획임
김인소 교무님 도덕교육원에서 원대 국어과학생(위원장님 강의 수강완료)과 백설공주 공부.
이중기 원장님 장녀 10월 4일 결혼
- ★ 8월 27일 SBS TV 지구촌 VJ특급 시간 최보광 원무님의 막내딸 요가일레 방송 출연. 중간 중간 에스페란토도 들을 수 있었습니다.
- ★ 원기 93년도 일원문화재단 연구비신청 (논문)
연구과제명: 국제어 에스페란토 활용을 통한 원불교 국제교화 방안의 연구
영문: The study on the method of missionary work abroad by using Esperanto
연구형태: 자유연구
지난 번 신청을 했다가 여러 가지 여건으로 재신청을 했습니다. 좋은 결실이 있을 것입니다.
- ★ 에스페란토 문화원(원장 이중기) 에스페란토 200기 강좌 기념식에 원불교 에스페란토회에서 축하를 했습니다. 더욱 발전하기를 기원합니다.
- ★ 2009년 폴란드 세계대회 참가안내
내년(2009년) 7월에 폴란드에서 있을 세계대회에 원불교 분과 개설 예정
대회 경비를 위한 적금을 6월부터 시작함
농협 551-12-588177 오순모
금액: 15만원 자동이체 월수: 12개월
- ★ 다음 카페 많이 이용해 주세요.
소식도 전하고 공부도 할 수 있는 곳입니다.
항상 만날 수 있는 다음카페 희망인:
<http://cafe.daum.net/zinio81>

강 습 안 내

강 습	시 간	장 소	비고
중 급	금 6시-8시	보화당 5층	
초급	목6시반-8시	보화당 5층	원익선
원역고 1년	목 3시	원역고	최은숙
원역고 2년	목 3시	원역고	원익선
원광대	수5-6,7-8	원광대	이중기
합천교당	화 목 7시	합천교당	한숙희
동안양교당	목 3-5시	동안양교당	10월9일

원불교 에스페란토 운동의 지속적인 발전을 위해 기금을 조성합니다.

**농협: 551-01-429836
(재) 원불교 (에스페란토회)**

연말정산시 세금 혜택을 받을 수 있도록 합니다.